



Recenze

Du mejloŝtonaj lernolibroj dum 50-jara instruista itinero

Hodiaŭ kun nostalgiaj pensoj mi foliumas la lernolibron "Valtatie kielitaitoon" (Privilegia Vojo al lingvoscio: Esperanto) de Vilho Setälä, eldonitan en la jaro 1958. Miaj 11–12 jaraj gelernantoj lernis el ĝi kvarhore semajne ek de la studojaro 1959–1960. Fascinaj estis kaj por infanoj kaj por instruisto la enkondukaj ĉapitroj, kiuj enhavis facilan lingvon ankaŭ al junaj studemuloj. Komprenoble la ilustraĵoj de la talentaj desegnistoj Asmo Alho kaj Kylli Koski vekis atenton. Oni sekvas la vivon de la familio Koko, al kiu apartenas kvin gekokoj. Eta porco estas ludkamarado el najbara tereno. Tamen iom post iom montriĝis, ke en tro rapida ritmo aperas en la teksto gramatikaj eroj, kiuj ne estis senpene kompreneblaj kaj digesteblaj. Zamenhof-lingvaj vortklarigoj donis tro pezan ŝarĝon al la junaj gelernantoj. Ni devis ŝanĝi, kaj elekti pli konvenan kaj praktikan lernolibron – "Junulkurson" de SAT-amikaro.

Antaŭnelonge Merja Väisälä donacis al mi la supre menciitan lernolibron (kiu iel perdiĝis el mia libraro.) Vilho Setälä omaĝis propramane la verkon al profesoro Kalle Väisälä (1893–1968), konata finna matematikisto kaj esperantisto. Mi konstatas, ke ĝia enhavo ankoraŭ liveras al mi interesajn, esplorindajn erojn. Ekzemple la vorto 'skutsledo' vokas por foliumi la vortaron de Joel Vilkki, kiu mencias tiun etimon. PIV notas 'skutilon' jene: ludilo kun du malgrandaj radoj antaŭa k malantaŭa k stanga direktilo, kiun la infano irigas, puŝante per unu piedo sur la teron. Ĉu vi rimarkas, ke ofte mi devas uzi vortarojn?

Estis vera plezuro por mi gvidi diversajn E-kursojn 1959–2009, – do entute dum 50 jaroj. Mi retiriĝis jam. Nun laŭbezone mi instruas privatulojn kaj estas revizoro en la loka societo de Turku. Feliĉe ekzistas je mia dispono tre taŭga lernilo "Esperanto mutkattomasti" de Stano

Marček adaptita por finnoj de Tuomo Grundström. La kunlaboro de slovakaj kaj finnaj pedagogoj portis belan frukton. Purkore mi povas rekomendi utiligadon de ilia kreaĵo. Sur la paĝoj estas nacilingvaj gramatikaj klarigoj kaj vortaro, kiuj mankis en "Valtatie Kielitaitoon". Pedagogie trafan tekston por komencantoj skribis Stano kaj modele ilustris lia filino Linda, ambaŭ talentaj fakuloj. Estas komprenebla la profunda ĝojo de la loka movada dojeno ĉe prestiĝa studmaterialo, profesie farita. En la mondo ekzistas multaj lernolibroj, pri kiuj mi raportis ion mallonge. La du menciitaj, al mi signifaj kaj gravaj estas unike mejloŝtonaj. Vilho Setälä siatempe ricevis multan laŭdon.

Nun mi varme kaj tutkore gratulas al Stano kaj Tuomo.

*Jorma Ahomäki
vicevizora korifeo el Turku*

